





EL LETEROJ AL LA REDAKCIO

FRAZARO POR MALSANULOJ

Laŭ via rekomendo mi tradukis la frazaron al la bulgara, sed mi ne scias la adreson de »Ruĝa kruco« kaj mi sendas la du tradukojn al Vi. Se vi ne ricevos pli bonajn (de pli famaj esperantistoj) tradukojn, vi povus uzi tiujn.

Mi admiras tiun gratulendan ideon.

D. Dimov,
Zavod za antibiotici,
Razgrad, Bulgario.

Resp. de la Red.: Dankon pro la alsenditaj tradukoj, tamen ne ni bezonas ilin. Nia propono estis ke vi, la tradukinto ĝin proponu al via landa Ruĝkruca organizaĵo, parolu kun kompetenta persono, klarigu al li ke en Nederlando jam la frazaro estas eldonita kaj estas utile uzata.

Ne diru ke ni el Beogrado pli facile trovas la adreson de la vialanda Ruĝkruco ol vi mem. Mi rekomendas malfermi telefonlibron de Sofio kaj trovi la adreson.

NIA KOVRILPAĜO

La norvega esploristo Thor Heyerdahl (meze) kun du el siaj kunvojaĝantoj sur RA-II, de maldekstre: Santiago Genovese (Meksiko) kaj Abdullah (Ĉado), kun la konstruata papirusboato RA-II, en Safi, Maroko.

Prenante ses kunulojn el ses diversaj landoj, el ĉiuj kontinentoj, Heyerdahl volis montri ke homoj diversdevenaj povas kunlabori, kiam ekzistas komuna tasko. Kvanke li simpatias kun Esperanto, li ne alvenis al la ideo adopti ĝin keil komunan lingvon. Mankis nur unu plua paŝeto por tio... tamen tre grava.

(Legu intervjuon en la internaj paĝoj).

NI KUNLIGU NIAJN FORTOJN!

Certe ĉiuj legantoj de »E. G.« n^o50 forte aprobas la prudentajn argumentojn, prezentitajn en la diskoniginda artikolo »En la oka deko de ni jarcento« de E. Sonnenfeld.

Estas konstateble, ke la nombro da cel-strebe laborantaj Esperanto-aktivuloj ne estas grandega, nuntempe. Tial, certaj el ili ne devus permesi al si la »lukson« agadi unuj kontraŭ aliaj — perdante utilan energion, tempon kaj monon — anstataŭ laboradi kune, laŭeble tolere, por pli rapide progresigi nian movadon.

Por atingi bazan interkonsenton pri tiu postulo, estas dezirinde aranĝi kunvenon — prefere: periodajn kunvenojn — de ĉefaj gvidantoj de UEA, SAT, IOE, la Landaj Esperanto-Asocioj kaj aliaj organizaĵoj (IEMW, KCE, Fakaj Eo-Asocioj, k. a.). Tio ebligas prepari terenon de praktika kunlaborado por sukcesigi certajn ĝeneralajn agadprogramojn. Aplikante la francan proverbon »L'union fait la force« (t. e.: unuigo donas forton), niaj ŝancoj agnosikigi Esperanton en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj medioj estos multe pli grandaj, ol se diversaj grupoj tro individuismaj laboradas dise, aŭ eĉ kontraŭas unuj la aliajn. Ni prenu kiel modelon la racian organizadon de certaj industrioj, de certaj politikaj partioj, de certaj eklezioj! Ni certe atingos maksimumajn rezultojn per la disponeblaj rimedoj, kiam ni kunligos ĉiujn niajn fortojn kaj kunetiros nian »ĉaron« en la saman direkton. Tio postulas iom de reciproka kompreno, toleremo kaj libervole konsentita disciplino flanke de ĉiuj kapablaj kaj celkonsciaj samideanoj.

Koncerne la nomon de I.O.E., mi proponas anstataŭigi »Instituto« per

»Instituto«. (Vidu en P.I.V.) Eble estus oportune adopti nomon pli adekvatan, ekzemple »Instituto por Aplikado de Esperanto« aŭ »Instituto por Praktikaj Aplikadoj de Esperanto« (I.P.A.E.). Mi petas la aktivulojn inter la legantoj de »E.G.« bonvoli konigi sian opinion pri la ĉi-supraj proponoj.

Germaine Kirtz
Mulhouse, Francujo

Resp. de la Red. Ni povas informi vin, ke ebleco de simila interparolo inter gvidantoj de diversaj partoj de la Esperanto-movado estis diskutata en la Direkcio de IOE, kaj ni tian bonvenigus. Tamen ni ĝis nun aŭdis pri tio ĉefe niajn proprajn direkciajn kaj aliajn kunlaborantojn, sed neniun voĉon »el aliaj flankoj«, krom de la institutoj, kun kiuj IOE jam kunlaboras.

Aliflanke ne klopodu trovi novan nomon por IOE, same kiel vi ne klopodos serĉi alian nomon por aliaj organizaĵoj, el kiuj multaj tion bezonas pli ol IOE. Tamen, pri tio respondecas ĉiu organizaĵo mem, kaj nek ni nek iu alia organizaĵo ŝatus ian ajn tiurilatan premon el ekstere. Ĉar, kedu min, sinjorino, eĉ se ni dek foje ŝanĝus la nomon, tiu kiu volas nin ĝeni, trovas pretekston por tio. Aliflanke, kiu volas kunlabori, faras kaj faros tion senkonsidere al nia nomo.

LA DRAKO EL KOMODO

Estimata Zagego,

Mi ĝojas ke en via traduko »Drako de la insulo Komodo« mi trovis gravan eksplikon (eblan) de la malnova kredo je drakoj kiuj blovas fajron. Tiu penso estas grava, ĉar ĝi ebligas scii kiel en la konscienco de primitiva homo (aŭ nur simio-homo) aperis tia ideo, por kiu ialoke eĉ hodiaŭ ne estas necesa stulta superstiĉo.

Dankante, Ioan Bettisch
Resita, Rumanujo



— Al mi ŝajnas ke ĝuste tie ĉi staris la tendo de niaj geamikoj.

USONA ELPAROLO

Rilate al »Pri: RECENZO DE PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO«, de s-ano E. Sonnenfeld (en EG 48—49), mi bedaŭras devi aldoni, ke en tuta Usono Illinois estas prononcata nek Ilinoj' (francmaniere) nek Ilinojs'. Oni primokus iun, kiu ĉi-lande uzus pseŭdofrancan prononcon -oa'. Tamen, oni almenaŭ sekvas la francan lingvouzon rilate silentan finan -s. Do, la unusola akceptita prononco estas Ilinoj'. Due, ke usonano prononcu Los Angeles kiel Loŭs Anheles estas tute neimageble. Unue, la vokalo de Los estas pura, monoftonga. En la »Generala Usona« dialekto (plej vastigata per televido kaj jam uzata ĉiuloke), la prononco de Los estas kun meze longa pura vokalo tute simila al esperanta a, t. e. las. Kelkaj jam formortantaj dialektoj de la Boston-regiono kaj la Sudo ankoraŭ diras los kun mallonga vokalo iom simila al esperanta o, kaj denove tute ne diftongan ou, kiu anglalingve nur okazas en malfermita silabo. Krome, neniun usonano, eĉ unu, kiu studis hispanan lingvon, uzus duonhispanigitan prononcon Anheles. En ĝenerala usona dialekto sole regas Anĝeles; antaŭe inter neuduktitaj parolantoj foje aŭdiĝis Anĝeles kun esperanta g, sed tio jam preskaŭ formortis, cedante, do, al las anĝeles aŭ pli precize anĝl's.

Samideane via,
prof. d-ro Richard E. Wood
Luisiana, Usono

INTERSANGO DE ARTIKOLOJ

Jus mi ricevis martan-aprilan numeron de EG, el kiu mi kun konsterno legis artikolon de Franz Schick, ke li skribante al ni kaj al aliaj sin anoncintoj ricevis neniun respondon je siaj leteroj. Bedaŭrinde ni nenion ricevis de li. Ni certe respondus kaj kun plezuro kunlaborus.

Mi jam skribis, ke mi ricevis tre malmultan kvanton da leteroj responde la anoncon en via EG kaj en aliaj E-organoj. Estis dissenditaj aparataj leteroj al E-organizaĵoj kun la sama propono, la rezulto estis preskaŭ nula. Ni, vi kaj ĉiuj skribintoj al ni, tutkore subtenas la ideon interŝanĝi tradukitajn freŝdatajn artikolojn, rakontojn, humuraĵojn k. s. Mi same opinias la ideon sana kaj utila. Tre mirinda estis la fakto, ke tre malmultaj reĉhis nian proponon. Mi opinias, ke multaj leteroj simple ne atingis nin, des pli la sin proponintoj plu ne respondas al ni post la unua letero. Mi ne povas diveni la kaŭzon.

Spite al ĉio ni ne volas, ke la ideo interŝanĝi tradukaĵojn pereu. Estus dezirinde, ke en via gazeto aperu propono, eble iu E-klubo, grupo prenu sur sin la taskon peri la interŝanĝon de la tradukaĵoj, aperigon

HISTORIA FOTO

Dum la Unua mondmilito, kiel soldato de la aŭstra-hungara armeo, mi troviĝis en 1916 en JAGODINA kaj tie eksciis pri agema esperantisto, direktoro de tiea lernejo, SRETEN ADŽIĆ. Tre amike li akceptis min en sia hejmo (min, la »malamikon« sed esperantiston). Ni kelkfoje amike interparolis kaj mi faris kelkajn fotojn pri li kaj pri nia kunesto, kun lernantoj ktp.

Se iu centro en Jugoslavio bezonas tiujn fotetojn dummilitajn por muzeo aŭ ia kolekta aŭ historia celo, volonte mi sendos ilin, ĉar ĉe mi, inter multaj aliaj fotoj kaj memoraĵoj, post mia morto ili certe perdiĝos aŭ ne venos en la ĝustajn manojn.

(Phkút), Harmatcsepp u. 33
Paŭlo Balkányi
Budapest 11/a, Hungarujo

de iliaj tradukoj en naciaj lingvoj. Tio ja estas bonega uzo de la lingvo internacia en praktiko. Ni ne devas perdi ankaŭ tiun okazon por montri al la publiko la eblecojn de Esperanto.

Ni alte taksas vian utilegan agadon uzi la lingvon kiel eble pli profunde en praktiko. Via laboro estas salutinda.

prezidanto de Junulara E-klubo

Eŭgeno S. Perevertajlo
abon-kesto 140,
Taŝkento-P, Sovetunio.

Resp. de la Red.: Sur alia paĝo de tiu ĉi numero vi povos konstati, ke la »rado ektorniĝis« inter Rumanujo kaj Norvegujo. Ni volonte notus pliajn kazojn de simila kunlaboro sur internacia nivelo. Se iu persono aŭ societo transprenus la perantecon, ni volonte helpus al tio.

DANK' AL LA ANONCO

Nia entrepreno sendis por enloĝigo en »EG« anoncon pri dezirata interŝanĝo de teknika kaj maŝinkonstrua literaturo (prospektojn k. a.) rilate al mekanikigo de la agrikulturo kaj bestbredado. En n-ro 46 ni jam povis vidi nian anoncon kaj atendi rezultojn. Feliĉe, ili ne malfruis. Ĝis la fino de majo ni ricevis interŝanĝe 289 prospektojn k. a., venantaj el 29 eŭropaj firmoj. Nur dum 5 monatoj! Bona rezulto kiu pruvas vian sloganon: »Pli valora la praktiko ol 100-hora prediko«. La gvidantaro de nia entrepreno ankoraŭ pli forte subtenas la uzon de Esperanto, vidante la rezulton eĉ de nur unu simpla anonco.

Ni dankas al ĉiuj helpintoj por Esperanto en la praktikon!

Hristo Manolov, tradukisto
Polski Trambeŝ, Bulgarujo



Paŭlo Balkányi (en uniformo) kaj Sreten Adžić, dum la milito, en 1916, en Jagodina (nun Svetozarevo).

Nota. La supra foto kaj du pliaj troviĝas ĉe la redaktoro de E. G., kiu povas ĝin disponigi laŭ la supra deziro de nia veterana kunlaboranto.

RECENZO DE REVUO

Antaŭ kelkaj tagoj ni sendis al vi specimenon de »LA NOVA TAJDO« organo de TEJA (Tokia Esperantista Junulara Asocio), kiu fondiĝis en 1962 kaj jam havas 200 membrojn.

Bonvolu recenzi ĝin sur Esperanto Gazeto, se tio ne ĝenas vin.

Izumi Nezu
por la redakcio de Nova Tajdo
Tokio, Japanujo

Resp. de la Red.: Estimata kolego redaktoro, mi povas diri al vi ke mi kun plezuro legis vian revuon, kaj kun ĝojo konstatis la progreson de la junulara movado en Japanujo. Apartan recenzon ni neniam faris pri iu ajn revuo, ĉar mankas spaco. Tamen, bonŝancon!

ABONO EN GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO


Mi deziras por 1972 aboni vian revuon »Esperanto-Gazeto« pere de viaj perantoj en GDR. Ĉu estas eble sendi al mi, pere de Hungara Esperanto-Asocio aŭ rekte, provokzempleron en kiu estas adresoj de perantoj en aliaj popoldemokratiaj landoj. por uzi tiun vojon, se oni sendas la rekte senditajn ekzemplerojn?

H. S., M 533 WELZOW, DDR

Resp. de la Red.: La Centra Laborrondo Esperanto de DDR povas al vi kaj ĉiuj aliaj interesigantoj el via lando doni la necesajn klarigojn, kiujn ni al ĝi donis. Tio validas por ĉiuj amikoj el DDR, al kiuj ni ne povas unuope respondi. Abono pere de alia popoldemokratia lando ne estas ebla, ĉar ankaŭ el ili ne estas permesate sendi monon. La sola ebleco estas trovi iun en iu lando el kiu mono estas sendebla al ni.

LA SESA SEMINARIO DE ESPERANTO KAJ LA „REGO“ PELÉ

De la 21-a ĝis la 25-a de la pasinta julio okazis en la urbo Campos (oni legu Kampos) ŝtato Rio de Janeiro, Brazilo, la **sesa Seminario de Esperanto**, kiun partoprenis esperantistoj el ĉiuj partoj de Brazilo kaj kelkaj el eksterlando.



S. F. Almada, tradukinto de «Mi estas Pelé»

La Seminario estis tre fruktodona, ne nur pro tio, ke oni lanĉis la libron «**Mi estas Pelé**», tradukitan de nia samideano F. S. Almada, sed ankaŭ ĉar ĉeestis amaso da junuloj, kiuj kun granda entuziasmo komprenis la kaŭzon de la internacia lingvo, proponante debatojn pri ĉio rilata al tiu temo. Fine la «maljunuloj» rekonis, ke oni devas helpi la junularon, iom agi laŭ sistemo nova, moderna, kio verŝajne pravigas niajn estontajn anstataŭantojn.

Estis inter ili bonegaj oratoroj, kiuj tiel korekte uzis la lingvon, ke oni dum kelka tempo imagis esti uzanta nacian lingvon, kaj tio ne okazis malofte.

Rilate la libron «Mi estas Pelé», lanĉita dum la Seminario, oni povas esti feliĉa, ĉar ĝi estis bonege akceptita, kaj jam estas mendoj de diversaj landoj, ne nur por ĝin havigi, sed ankaŭ por ĝin traduki en la nacian lingvon.

Tiu libro havas interesan «historion»: okaze de la V Seminario, en Belo Horizonte, ni prezentis tezon pri la enkonduko de Esperanto en la rondon sportan, laŭ sugesto de nia samideano Tibor Sekelj, de la Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE), kaj tiam ni prezentis al ĉeestantaro la numeron 42 de «Esperanto Gazeto», organo de IOE, kiu aperigis sur la paĝo 7-a, intervjuon kun Pelé, faritan de ni, kaj ĝi estis tiel grava, tiel entuziasme aplaudita, ke oni sugestis al mi traduki la libron «Eu Sou Pelé», rememoroj de la «reĝo», de li verkita.

Post ricevo de la eldonrajto pri la eldono en Esperanto por la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kaj aŭtorrajtojn rezervitajn, mi laboris dum du monatoj, kaj finfine, oni pretigis la libron por esti lanĉita okaze de la VI Seminario de Esperanto.

Ĝi aperigas la cititan intervjuon sur la dorso de la kovrilo, kaj ĉion rilatan al la lastaj jaroj de la reĝo, kio tamen ne troviĝas en la verko originala, ĉar ĝi estis lanĉita post la jaro 1959-a, kiam Brazilo fariĝis monda ĉampiono la duan fojon.

Pro tiu traduko volis aŭdi la tradukinton la fama radioelsendejo novjorka «Voĉo de Ameriko» kun filio en Rio de Janeiro, krom preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj kaj televido de Rio de Janeiro kaj Sanpaŭlo.

Je la nomo de IOE la Seminarion salutis kunlaboranto L. Brieger.

F. S. Almada

Ĉesperanta ĉiĉerono

30-persona grupo de ĉiĉeronoj el Jelenia Gora (Pollando) vizitis en aprilo la ĉefurbon de Ĉeĥoslovakio



Ĉiĉeronoj gvidataj en Prago per Esperanto

kaj dum tri tagoj profitis la lertan gvidadon kaj la eksplicojn de la urba ĉiĉerono Ferdynand Dryak, kiu dum la tuta tempo uzis Esperanton.

Sur la foto s-ro Dryak dum la laboro. La eksplicojn tradukis s-ro T. Tyblevski.

14-a KANADA KONGRESO DE ESPERANTO okazos en Victoria B. C., 24—26 julio 1972, kun tre interesa programo. Eksterlandanoj estas bonvenaj.

PSIKOLOGIAJ MALHELPOJ KONTRAŬ INTERLIGNVO

Artikolo el «Informilo» de Internacia Esperanto Muzeo en Vien citas:

«En la Dana Esperanto-Bulteno 4/71, M. Christoffersen ekzamenas en mallonga artikolo «Ĉu ni aspektas tro noblaj?» la psikologiajn malfacilojn, kiuj kontraŭas la varbadon por Esperanto. Li citas kvar vidpunktojn pri tio:

1. La ordinara homo ne kredas je sukceso de Esperanto, tial li opinias neutile lerni ĝin.
2. La klera homo, kiu lernis fremdajn lingvojn kaj laŭ tio estas «lingvo-kapitalisto», timas ke lia investita kapitalo estos minacata en la kazo de venko de Esperanto.
3. El la malmultaj homoj kiuj scias ion pri Esperanto, la plej multaj havas tiel malgrandan scion ke ili opinias ke artefarita lingvo ne povas esprimi sentojn kaj nuancojn kiel «natura» lingvo.
4. Se, tamen, Esperanto sukcesus, ili timas ke ĝi forpuŝos la nacian lingvojn.

Tio evidentigas, ke niaj opoziciuloj estas precipe ne sufiĉe orientitaj homoj, lingvo-kapitalistoj kaj lingvo-ŝovinistoj, kiuj volas subpremi nin per neatento, per ridindigo aŭ per piedbatoj. Por kontraŭi tion, ni devas ĉesi esti defensivaj kaj komenci agi ofensive. Krome ni diru en Esperanto nur tion kio koncernas la esperantistojn mem, kaj ni turnu nin al ne-esperantistoj nur en nacia lingvo. Tio estus grava ekz. por la enigo de oficialaj publikigaĵoj de esperantistaj organizaĵoj en bibliotekojn en kiuj ili ne povas efiki, se en Esperanto.

Psikologiaj malhelpoj povas esti venkataj nur per psikologiaj rimedoj, ne krude aŭ malnoble. Nur pacienco necesas kaj plua nelaciĝo kaj kompreneble, ankaŭ **novaj ideoj**. »A. B.«

NOTO. — Ĉar la aŭtoro serĉas **novajn ideojn**, estu al ni permesate proponi almenaŭ unu, eĉ ne tiom novan.

La meditado de M. Christoffersen estus sendube ĝusta, se ni troviĝus en 1911 kaj ne en 1971. Dum tiuj ĉi lastaj sesdek jaroj okazis ne nur du mondmitoj, sed multaj revolucioj, sangaj kaj sensangaj, el kiuj verŝajne la plej gravaj estas tiuj kiuj okazis en la cerboj de la homoj. Sed ni esperantistoj ilin ne rimarkas, aŭ ne volas rimarki. Ni vivas en la samaj iluzioj, kiujn ni flegadis antaŭ multaj jaroj, kaj daŭre draŝas la saman pajlon jam delonge senĝrajnan, kiu jam delonge neniu povas allogi.

La psikologiaj konstatoj estas ĝustaj, se temas pri iu abstrakta ideo, penso aŭ propono, sed ne se temas pri praktika realaĵo. Oni povas hodiaŭ ne kredi ke la homo iam atingos Marson. Sed en la momento kiam tio estas realigita, la temo pri kredo aŭ ne kredo ne plu estos aktuala.

Kiel okazas ke la «lingvaj kapitalistoj» fariĝis tiaj? Ili lernis la anglan, la francan, kaj poste eble ankoraŭ la germanan aŭ rusan. Multaj post tio havis tempon ankoraŭ por lerni la hispanan aŭ la italan — sed neniel Esperanton. Do ne estas la situacio, ke «lingva kapitalisto» lernas unu lingvon kaj tiam fermas sin por ĉiuj aliaj. **Lia lingva kapitalo tute ne ĝenas lin por akiri pliajn lingvojn. Sed kial ne ankaŭ Esperanton?**

La lingva ŝovinisto, kiu volas gardi pura sian lingvon, ankaŭ ne timas lerni la anglan aŭ la francan aŭ

I. SKIZO DE DEONTOLOGIA KODO PRI DISKUTOJ INTER ESPERANTISTOJ

- a) Kredi en la honesteco de la kontraŭulo. Kritiki ideojn sed ne ataki personojn.
- b) Ne celi la nepran triumfigon de sia vidpunkto super ĉiu alia, sed serĉi la veron aŭ la komunan volon per amika apudmeto de malsimilaj opinioj.
- c) Klopodi trovi la pozitivajn kaj pravajn punktojn en la rimarkoj de la malsam-opinianto; esti preta akcepti ilin, agnoski sporte sian malpravin kaj favori kompromison inter malsimilaj ideoj.
- e) Esti konvinkita, ke neniu -eĉ ne si mem- estas ne-erarebla.
- d) Eviti retorikon, demagogion, akran kaj agreŝivan tonojn, ironion, sarkasmon, orgojlan kaj dogman sintenojn.
- e) Eviti transformi diskuton en disputon. Eviti polemikojn.

(G. C. Fighiera)

eble la rusan, ne timante ke tiu kono forpuŝos lian nacilingvon. Sed kial li rifuzas lerni ĝuste la internacian, kun plej malgranda influvo?

Ĉu al iu kandidato por lerni iun lingvon, ne gravas kiun, eĉ malajan aŭ pisanan, iam alvenis la ideo demandi ĉu ĝi povas esprimi sentojn kaj nuancojn, kaj per tio kondiĉigi sian lernadon? Estus ja sensece tion supozi.

Mi volas kredi ke miaj legantoj jam deduktis la respondon al ĉiuj ĉi supraj demandoj, kiuj fakte reduktiĝas al unusola demando: **KIAL ONI LERNAS LINGVON? Oni lernas lingvon, gravan aŭ negravan, kun granda esprimovo aŭ sen ĝi, altrudeman aŭ ne, simple ĉar ĜI ESTAS NECESA. Kaj lingvo fariĝas necesa, ĉar ĝi estas UZATA.**

Por lernado de la angla lingvo oni elspezas multe da mono, tempo kaj energio, ĉar ĝi estas uzata en trafiko, en hoteloj, en kongresoj, en filmoj, en scienco, pli ol la aliaj. Dum vojaĝo tra Nova Gvineo mi lernis la pisanan lingvon, ĉar ĝi tie estas uzata, kaj sen ĝi mi ne povis komuniki kun la homoj. Dum la lastaj kvin jaroj ĉiun jaron centoj da pupteatristoj lernas Esperanton pro praktika celo: partopreno en porfesia pupista festivalo, ĉar en tiu festivalo tiu estas la lingvo nature uzata, la lingvo kiu praktike ebligas la partoprenon en PIF. Neniu el la 500 fakuloj demandis ĉu nuancoj povas esti esprimataj en Esperanto, ĉu ĝi forpuŝos la nacilingvon, kaj neniu diris ke li rifuzes lerni E-on, ĉar li jam konas tri aliajn lingvojn.

Jam estas tempo ke ni konvinkigu, ke nur la enkonduko de Esperanto en la praktikan uzon en la plej diversaj fakoj de la homa aktivado sur internacia nivelo povas sukcesigi Esperanton kiel internacian lingvon.

En la nuna momento vane estas ke ni inter ni kongresu ĉiujare nur por kongresi; ke ni stimulu la interesesperantistan helpon; ke ni eltiradu de la esperantistoj monon sub diversaj pretekstoj sed fakte nur por subteni nian internan administradon; vanaj la ŝultrofrapetoj kiujn ni almozas ĉe Unesko kaj aliaj. **La SOLA INDA laboro por Esperanto nuntempe estas la klopodo enkonduki ĝin en la praktikan uzon.** Ĝis kiam la gvidantoj de nia movado tion ne komprenos, ĝis kiam ili serĉas psikologiajn pretekstojn por senkulpiĝi nin pro la konstantaj malsukcesoj, niaj fortoŝtreĉoj estas vanaj, ĉar **NI PALPAS EN MALLUMO.**

T. Sekelj

MI VENAS DESUR MARSO PRO VIA MALSATO

9. de majo: La longa marŝo de «HELPEMAJ MANOJ» trapasis Romon. En kvindek unu landoj kvar milionoj da gejunuloj piediris 56 milionojn da kilometroj (distanco Tero-Marso) petante konkretan kontribuon por helpi la evoluigon de la «tria mondo».

Kio estas «HELPEMAJ MANOJ»? Ĝi estas internacia movado por ekmovi la publikan opinionon por helpi senesperajn homojn.

Fondis ĝin misiistoj kaj laikuloj. En la «longa marŝo» partoprenis kvar milionoj da personoj. Ĝi estas la plej granda manifestacio de fra-

teco en la historio de la homaro. La partoprenantoj deziras favori la «verdan revolucion», tio estas, pacan revolucion por evoluigo kaj egalrajtigo de la tria mondo.

Estas klarigenda, ke tiu ĉi marŝo ne estas nur simbola ago, sed ĝi devas efektive kontribui al la supre nomita entrepreno, per kolektado de monaj kontribuoj.

Ĉiu marŝanto havas dokumenton kiun li subskribigos per laŭeble plej granda nombro da civitanoj. Ĉiu el ili devigas sin pagi certan sumon po ĉiu kilometro marŝita de la «piedonaŭto».

Laŭ la vojiro oni kontrolas kaj dokumentos la faritajn kilometrojn. La kolektitan monon oni destinas al kreado de lernejoj, por agrikulturo ktp. Oni esperas ke tiu ĉi iniciato savos multajn vivojn en Pakistano, kiujn buĉas la malsato.

Koncerne la marŝon, la plej optimistaj sentis pri miliona partoprenantaro, sed la realo superis ĉiujn esperojn.

Tradukis el «Radiocorriere» Eugenio Fabian

Laŭ via slogano (pardonu! NIA!): Pli valora la praktiko ol centhora prediko. Mi ĉiam provas pruvi la taŭgecon de Esperanto por io ajn. Jen, por kio ni utiligas nun ĉi tie la Internacian Lingvon.

La 4-an de decembro 1970 aperis intervjuo kun Thor Heyerdahl en hungarlingve eldonita centra kultura kaj scienca semajna gazeto: A HÉT. Kiel okazis la tuta afero? Simple. Redaktoro de la gazeto Veress Zoltán redaktis la demandojn, mi esperantigis kaj sendis al mia norvega amiko, ĵurnalisto Olav Thormodsen. Li tradukis al norvega lingvo kaj alvenigis al Thor Heyerdahl, kiu afable respondis. Liajn respondojn mia amiko Olav esperantigis kaj fine post mia hungarlingva traduko la intervjuo aperis en la semajna-gazeto A HÉT. Mi certigas Vin, ke la intervjuo elvokis grandan interesiĝon inter la legantoj, inter la larĝa publiko de intelektularo.

Ĉi tiun Esperantlingve peritan intervjuon sekvis alia, kun Baldur Ragnarsson, kaj nun sekvas denove aliaj. Hodiaŭ mi sendas al Vi la intervjuon faritan kun Thor Heyerdahl.

Sigmond Julia
Cluj, Rumanujo

Demando: Vi riskis vian vivon plurfoje, por konfirmi la konstatacion de Thomas Mann: profundega estas la putro de la pasinteco (Joseph und seine Brüder), kaj klopodante pri la dokumentado de aŭdacaj hipotezoj, trezoron de la sciencaj konoj suprenigi el tiu ĉi profunda putro. Per ĉio ĉi, certe ne nur la scion (erudicion) de la homaro Vi volas pligrandigi: ne nur instrui, sed Vi volas ankaŭ eduki viajn samtempulojn.

Respondo: Mi volonte deziras montri al la nuntempaj homoj ke — kvankam ni sukcesis ŝanĝi tion kio ĉirkaŭas nin, ni ne sukcesis ŝanĝi nin mem. Almenaŭ dum la lastaj 5000 jaroj la homaj inteligenteco

kaj inklinoj estis la samaj kiel hodiaŭ. Ni iomete komencis kompreni ke homoj ne estas pli malaltstaraj pro tio, ke ili devenas de lando ekster nia propra landlimo aŭ estas el alia kontinento. Sed ni ankoraŭ ne lernis kompreni, ke ĉi tio estas valida ankaŭ kiam temas pri niaj prapatroj vivintaj antaŭ kelkcentoj da jaroj.

Demando: Ni supozas, se Vi en la epoko de la supersona aviado transveturis per floto oceanon, en la epoko de la unuaj lunvojaĝoj per papyrusbarko alian, tiam ĉi tiujn vojaĝojn Vi konsideris ĝuste tiel signifajn, kiel novajn entreprenojn, progresigante la eblecojn de la tekniko. En kio Vi vidas la plej gravan — ne praktikan, sed esencan — dife-

rencon inter viaj vojaĝoj kaj — ekzemple — inter la realigo de la surlunigintaj kosmonaŭtoj?

Respondo: Mi kredas, ke la plej grava diferenco inter miaj vojaĝoj kaj la surlunigo de la kosmonaŭtoj estas ke la kosmonaŭtoj kaj iliaj kunhelpantoj klopodas kontraŭlabori kaj venki la natur-leĝojn por efektiviĝi sian vojaĝon, dum mi, pere de Kon-Tiki kaj Ra klopodis kunlabori kun la naturo por realigi la vojaĝojn miajn.

Demando: Nia publiko kun egala interesiĝo sekvis la fazojn de la unua lunvojaĝo kaj la mar-vojon de Ra II; evidente oni supozis ian komunan sencon en ambaŭ komplete malsimilaj entreprenoj. Pli supre ni petis vian opinion pri la diferenco, nun pri la simileco — se ankaŭ Vi tiel kredas, ke ekzistas ia supozata komuna trajto.

Respondo: La simileco inter la vojaĝoj de la kosmonaŭtoj kaj miaj per Kon-Tiki kaj Ra I kaj II estas unuavice montri sinregon kaj eviti nervan interfrotigon kun siaj kunuloj kiujn oni estas devigataj havi tutproksime al si tage-nokte dum longa tempo ne havante ian eblecon forlasi unu la alian se oni tion dezirus. Cetere oni nokte tage devas esti pretaj alfronti danĝerojn, kaj pretaj improvizi solvon por saviĝo se subite oni devas alrigardi neatendatan mort-minacon. En tiajpecaj situacioj komuna trajto de ambaŭ specoj de ekspedicioj estas ke oni devas forpeli ĉian egoismon. Oni estas dependa de la helpo de siaj kunvojaĝantoj, kaj sekve oni devas ĉion fari por helpi ilin.

Demando: Kvankam la scienculoj Vin rigardas unuavice kiel esploriston, la publiko — almenaŭ ĉe ni, kie viaj libroj estas eksterordinare popularaj — aprecas Vin unuavice kiel verkiston. Ni kredas, neofendante Vin, nek la antaŭe menciitajn per nia opinio, ke via fakspecialaĵo kaj la ĉefa temo de viaj verkoj estas unuavice la vivo perceptita kiel vireca aventuro, kiel ĉe Jack London kaj Hemingway. Ĉu Vi ne pensas, ke nia moderna mondo prezentas senĉese malpli da eblecoj tiurilate?

INTERVJUO AL THOR HEYERDAHL



Thor Heyerdahl kun siaj boliviaj konsilantoj por la konstruo de RA-II.


malnovaj civilizacioj. Ĉu estas eble, laŭ via opinio, dedukti konkludantajn leĝojn el ties historio, kiuj validu — aŭ tiel ŝajnu — koncerne la aktualan civilizacion?

Respondo: Ĝis nun en la historio de l'homaro neniam ekzistis iu civilizacio kiu kapablis postvivi. Ke ni sukcesu ĉi-foje postvivi necesas malpli

pensi pri armiloj kaj potenco kaj pliagrade pri nutraĵo kaj homa kompreno por tiuj, kiuj malsatas kaj alimaniere pensas.

Demandis: Zoltán Veress
Respondis: Thor Heyerdahl
Tradukis: Julia 'Sigmond kaj Olav Thormodsen

RA-II jam apenaŭ estas videbla el la akvo. La kano ensorbis akvon kaj tiras la konstruaĵon profunden... sed ĝi eltenos ĝisfine.



KIEL MI FARIGIS «KOTA HOMO» NOKTO DE TERURO INTER KAPĈASISTOJ AMO KAJ ANTIAMO EN NOVGVINEO

Jen nur tri el la dek titoloj sub kiuj aperos en la proksimaj dek numeroj de «Esperanto Gazeto» artikoloj de Tibor Sekelj pri lia ĵusa esplorvojaĝo tra Novgvineo.

Krom ili vi trovos en E. G. la kutimajn stimulaĵajn artikolojn kaj interesajn el la movado kaj la mondo. Ankaŭ la originala Esperanto—bonhumoro ne mankos, kiel kutime, same kiel la jam famigintaj «Leteroj al la redakcio».

Abonprezo: por 1972: US \$ 2.50 aŭ egalvaloro Fruaj abonantoj ricevos senpage la decembran numeron.

Listo de perantoj sur la lasta paĝo.

**esperanto
gazeto**

LA PLEJ MALMULTEKOSTA INTERNACIA REVUO EN ESPERANTO



Esperanto konkeras novajn poziciojn en la internacia turismo

De kelkaj jaroj mi legas en la esperanto-gazetaro aŭ aŭdas de partoprenantoj informojn pri la ĉiujaraj Internaciaj Turistaj Renkontiĝoj en Seged (Szeged). Ĉi-jare mi firme decidis nepre vojaĝi al tiu hungara universitata urbo kaj mem sperti tion, kion mi legis aŭ aŭdis.

La atmosferon de la renkontiĝo, kiu similas al la ceteraj grandaj internaciaj esperanto-aranĝoj mi eksentis en la vagonaro per kiu mi vojaĝis de Budapeŝto al Seged. La kunveturantoj: bulgaroj, poloj, germanoj, ĉeĥoj, hungaroj, k. a. vigle kaj ĝoje interrilatis per esperanto.

En la akceptejo — nova, moderna lernejo, situanta apud la arko de la herooj — regis granda bruo, ĝi vere similis al abelujo. Jen Bojĉo Mladenov, bulgara instruisto, kiu venigis siajn lernantojn, ĉirkaŭbrakas unu el siaj amikoj kun kiu li interkonatiĝis dum la pasintaj kvin renkontiĝoj. Apud ili interkonatiĝis germano kun polino. Gaja zumado ŝvebas. Ĉiuj parolas, gestas, ridas, krias.

Gesinoroj Székely (Sekelj), ilia filino Eva, kaj S-ro Mauksinszky (Mauksinski), sekretario de la urba esperanto-societo k. a. hungaraj esperantistoj penas respondi kaj laŭeble kontentigi ĉiujn. Ili estas afablaj, helpemaj, ĝentilaj, eĉ tiam kiam ili estas devigataj simplajn aferojn pokelkfoje klarigi al la persono. Rapide ĉiu ricevas la necesajn papearojn por dormado, manĝado, trinkado, pri kulturaj kaj aliaj aranĝoj. Se estas necese oni klarigas kiamaniere la alvenintoj atingu siajn loĝejojn. Ofte kunlaborantoj gvidas grupojn aŭ unuopajn personojn al iliaj loĝejoj.

La plimulto de la partoprenantoj en la renkontiĝo loĝis en studentaj hejmoj en komuna loĝejo. Mi ankaŭ loĝis en la kolegio ne pro tio, ĉar la kotizo estas iomete pli malgranda, sed pro tio, ĉar oni povas droni komplete en internacian atmosferon. Tie mi povis paroli kun personoj el diversaj landoj, okazas diskutoj kaj disputoj, regalaj kaj eĉ improvizitaj internaciaj belartaj programoj.

La ĉefkuiristo havis la malfacilan taskon kuiri manĝaĵojn por reprezentantoj de dek nacioj: poloj, germanoj, ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj, serboj, bulgaroj, litovo, svisoj, kazaĥoj, kanadano. Feliĉe la hungaraj manĝaĵoj kun malgranda modifo sukcesis kontentigi preskaŭ ĉiujn.

Ĉe la inaŭguro kaj ĉe la fermo de la renkontiĝo kantas esperantajn kaj aliajn kantojn segeda gea koruso.

La interkona vespero okazis en la luksa hotelo-restoracio — »HUNGARIO«.

La programo de la Internacia Turista Renkontiĝo (ITR) estis strikte plenumata. Sen ŝanĝoj kaj precipe

en la fiksita tempo oni iris al la muzeo, kiu havas esperanto flankon, bildgalerio, industria foiro. Okazis ankaŭ ekskurso tra la urbo per panoramaj aŭtobusoj, veturado per ŝipo sur rivero Tisa kaj promenado en la botanika ĝardeno. Estis malgrandaj ekspozicioj en la akceptejo pri Bulgarujo kaj Soveta Kazahstano. Bojĉo Mladenov prelegis pri la temo: Bulgarujo — lando de rozoj kaj G. Dimitrov. Kelkcentoj de la partoprenantoj vizitis la domon kie naskiĝis kaj longe vivis la hungara esperanto-poeto kaj verkisto Julio Baghy.

Multaj partoprenantoj de ITR preferis tage viziti la strandon, kaj vespere spekti fabele belajn baletan, operon aŭ hungaran folkloran spektaklon, ludatajn sur la scenejo de la grandioza subĉiela teatro kun ĉirkaŭ 7000 sidlokoj Antaŭ la urba katedralo.

Ĉe la bordo de Tisa en originala fiŝista restoracio internacia komisiono elektis gefraŭlojn »ESPERANTO« — Nina Berĉeva, Bulgarujo, kaj Azriel Kutasov, Litovujo, gefraŭlojn »FESTIVALO« Eva Székely, Hungarujo, kaj Bojĉo Mladenov, Bulgarujo, gefraŭlojn »VOLANTURIST« Katja Oĉias, Pollando, kaj Boris Panŝin, el Kazahstano. De oficejo VOLANTURIST ĉiuj elektitaj ricevis: kaŭĉukan matracon, porcelanan servison aŭ litkovrilon. Dum la dancado Halina Dubrowska kaj ŝia edzo, el Pollando ricevis premion kiel bone kaj elegante dancanta paro: esperanto-kaptukon kaj diskon donitajn de la ĝenerala sekretario de la Internacia Esperanto-Asocio »MONDA TURISMO«.

K-do Hantos — vicprezidato de la Departamenta Konsilantaro ekceptis kaj regalas kvindek da gvidantoj de grupoj el Hungarujo kaj eksterlando, respondeculojn pri la ITR kaj aktivulojn de la esperanto-movado. Montrante al la ĉeestantoj parton de moderna kaj bela departamenta konstruaĵo li diris, ke la estontaj niaj renkontiĝoj povas esti inaŭgurataj kaj fermataj en la luksa salono.

Por unua fojo dum la ĉi-jara ITR aperadis tajpita bulteno, pendigita en la manĝejo kaj en la komunaj loĝejoj. La bulteno »ESPERANTO-TURISMO« estis legata kun intereso. Ĝi traktis ne nur problemojn de la ITR sed ankaŭ ĝeneralajn esperanto kaj aliajn eventojn.

Mi havis la okazon kelkfoje paroli kun Radics János — direktoro de la oficejo »VOLANTURIST« pri la eblecoj por plibonigo de la estontaj ITRF kaj ĉefe ties esperanto-parto. Pro tio, ke kelkaj proponoj superis lian kompetentecon li aranĝis por mi renkonton kun la vicdirektoro

de la trusto »VOLAN« en Budapeŝto d-ro Jozef Zahumanky. La kunsidon partoprenis ankaŭ po du elstaraj gvidantoj de »VOLANTURIST« el Seged kaj Budapeŝto. Ĉeestis kaj tradukadis kaj vigle partoprenis la diskutojn prof. Emeriko Székely, kiu estas la animo kaj la motoro de la renkontiĝoj. Pli ol du horojn ni parolis. Oni akceptis ĉiujn miajn proponojn. Koncize dirite ni interkonsentis pri jeno:

1) La trusto »VOLAN« pere de sia oficejo »VOLANTURIST« en Seged efektive kunlaboradon kun ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri internacia turismo kaj speciale kun la Internacia Esperanto Asocio »Monda Turismo« kaj la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. En la okazontaj ITRF oni pli grandigos kaj variigos la programon ĉefe per programeroj kiuj permesas la utiligon de esperanto. En la kadro de ITRF estu esperanto-festivalo. Oni invitos esperanto-teatrojn, kanzonkantistojn, folklorajn danc kaj kant-grupojn partopreni la festivalon. Estu aranĝataj diversaj interesaj prelegoj, projekciado de filmoj, ekspozicioj, tuttaga ekskurso inkluzive vizito de uzino kaj agrikultura kooperativo. La elektoj de gefraŭloj »ESPERANTO, FESTIVALO, VOLANTURIST«, okazu en ĉiu renkontiĝo.

2) La trusto »VOLAN« eldonos diversajn prospektojn, mapojn, broŝurojn, k. a. materialojn en esperanto pri siaj aktivecoj kaj speciale pri la Internaciaj Turistaj Renkontiĝoj — Festivaloj. Oni aperigos ankaŭ reklamojn en la esperanto-periodaĵoj.

3) Ek da 1972 ITRF okazu en novaj, modernaj studentaj loĝejoj, situantaj en granda parko, kun restoracioj, subĉiela teatro kaj strando, sportaj ludejoj kaj amuza parko. Por la partoprenantoj, kiuj ne scipovas esperanton estos organizita facila kaj praktika elementa kurso.


La 24-an de julio okazis solena fermo de la renkontiĝo. Multe da personoj, hungaroj kaj alilandanoj ricevis grandajn bukedojn kaj donacojn pro ilia aktiva kontribuo al la sukceso de la ĉi-jara renkontiĝo.

Partoprenu la INTERNACIAN TURISTAN RENKONTIGON-FESTIVALON 1972 — por mem sperti tion kion Vi nun tralegis. Oni povas akcepti pli ol 1000 personojn, kondiĉe ke ili aliĝos en la fiksita tempo.

Petu detalajn informojn

1. VOLANTURIST, Hungarujo, Szeged.
2. Emeriko SZÉKELY, Hungarujo, Szeged, Szivárvány str. 29.

Nikola Nikolov
(Monda Turismo)
pk. 45. Sofio, —C., Bulgario.



Sceno el la prezentaĵo de »Neĝa Reĝino« de Andersen far de la Pupteatro el Ruse, Bulgarujo.

PIF ... PIF ... HURAAA ...

De la 2-a ĝis 9-a de oktobro 1971 okazos en Zabreb, Sisak kaj Vrajdin la kvara Pupteatra Internacia Festivalo. Evidente, la vojo de Esperanta penetrado en puparton montris rapidegan evoluon. Ankaŭ tiu ĉi jaro signas tion per pliampleksigo de la Festivalo al tri kroatiaj urboj, per pligrandigo de la nombro de partoprenantaj teatroj al 7, per antaŭkontraktitaj televidaj filmadoj de tri pupteatraĵoj flanke de televido Zagreb kaj Sarajevo.

Intereson montras ankaŭ televido Vieno, kiu delegis observanton. Rilate la antaŭenmarŝon en pupistaj rondoj prezentigas same multaj rezultoj. La nombro de pupteatroj kun Esperantaj programoj kreskis al ĉirkaŭ 30, la Festivalon observos unu el la ĉefaj mondaj pupteoriistoj, d-ro Henryk Jurkowski el Varsovio, korespondado pri la Festivalo ampleksas nun jam kontaktojn kun pli ol 50 pupteatroj sur ĉiuj kontinentoj.

Cefprotektanto de la Festivalo estos la urbestro de Zagreb, k-do Josip Kolar. Aŭspicios UNIMA (Monda Pupista Asocio), Kroatia Asocio de societoj »Niaj infanoj«, IOE, multaj zagrebaj revuoj kaj pluraj fabrikoj. Krom la faka jurio, la Festivalon juĝos ankaŭ internacia infana jurio konsistanta el 5 infanoj el diversaj landoj — parolantaj Esperanton.

Jen la ĉi-jara programo:

1. Pupteatro el Ploesti (Rumanujo): »La lanughometo« de A. Popesku, Pupfabelo pri revoj, sonĝoj kaj deziroj.
2. Pupteatro el Budapeŝto (Hungarujo): »Mistero en anasejo« de Julio Urban. Carma porinfana kriminalhistorio.
3. Pupteatro el Ruse (Bulgarujo): »Neĝa reĝino« de H. K. Andersen. Muzika pupfabelo.
4. Pupteatro »Marcinek« el Poznan (Pollando): »Hefesto« de Anna Swierszczynska. Moderna muzika pupteatraĵo laŭ greka mitologio destinita al pli aĝa junularo.


5. Pupteatro »Pinokio« el Lodz (Pollando): »Birdo de Luno« de Jan Osnica. Moderna pupfabelo pri vojaĝado en universo.
6. Pupteatro el Osijek (Jugoslavio): »Li kaj li« de Bohdan Slavik. Pupmimikaĵo en nigra tekniko.
7. Pupteatro el Konstanca (Rumanujo): »La museto kaj la pupo« de A. Popoviĉi. Pasintjara venkinto.

Krom la Festivalo, kontentige evoluas ankaŭ la turnea servo de pupteatroj. Estas organizata turneo de pupteatro el Košice (CSSR) tra Skandinavio kaj ĵus plenumiĝas tiu de pupteatro el Cluj (Rumanujo) tra Jugoslavio. Daŭre estas serĉataj esperantistaj kunlaborantoj en ĉiuj landoj — speciale en okcidenteŭropaj. Jam nun estas en plena preparo ankaŭ la jubilea kvina PIF. Ĝi okazos de la 30-a de septembro ĝis la


7-a de oktobro 1972. En tiu SUPER-PIF renkontiĝos 5 venkintoj de la ĝisnunaj PIF-oj kun 5 novaj ensembloj. Entute 10 teatroj plenumos 60 prezentaĵojn en 4 kroatiaj urboj kaj kelkajn postkongresajn turneojn tra Jugoslavio.

Granda deziro de la organizantoj de PIF estas nun havi kiel eble plej multnombrian internacian infanan publikon komprenantan Esperanton. En la PIF-urboj oni jam komencis instrui en deko da elementaj lernejoj kiuj pretas interŝanĝe akcepti geamikojn el aliaj landoj en siaj hejmoj dum la daŭro de PIF. Se vi ne povas utiligi jam la ĉi-jaran okazon, pensu jam nun pri la plej grandioza porinfana manifestaĵo en Esperanto en 1972. Kore atendas viajn informojn kaj anoncojn PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO, Amruŝeva 5/I, 41000 Zagreb, Jugoslavio.

Mladenka



Sceno el »Anaseja mistero« de Julio Urban prezentota de la Hungara Ŝtata Pupteatro.



RECENZOJ

MIEDZYGORZE — okpaĝa faldprospekto en Esperanto, ilustrita kun urboplano, prezentanta la jam faman internacian esperantistan kunvenejon.

CIESZYN — ilustrita turisma broŝuro pri tiu interesa malnova pola urbo, en pola lingvo, kun resumo en rusa, Esperanto kaj germana. Tiam manieron, en kiu oni donas al Esperanto la saman valoron kun la naciaj, lingvoj ŝajnas al ni tre trafa.

ĈESKOSLOVENSKO, Ždiar. — Bele eldonita kolora broŝuro pri parto de la Tatra nacia parko, kun elĉerpa listo de loĝeblaj domoj. La broŝuro estas nacilingva, sed al ĝi estas aparte aldonita vasta informo broŝuro en Esperanto.

NOVA GEOGRAFIO KAJ NOVAJ TEMPO-MEZUROJ. De NIO. Broŝuro 32-paĝa + kovrilo, Poŝformata, Sotto il Monte Giovanni XXIII (Bergamo) 1971.

En tiu ĉi broŝuro, originale prelego en la Milana Esperanto-Klubo, la aŭtoro prezentas amblician planon. Fakte tri planojn, pri ŝanĝo de geografiaj mezuroj kaj nomoj, ŝanĝo de la hor sistemo kaj de la kalendaro. Iom tro por unu homo.

Li proponas la 360 meridianojn ŝanĝi al 400 kaj la 90 paralelojn al 100. La kvadratoj tiel ricevita estu dividitaj en pluajn cent, kaj tiuj al pluaj cent. Ĉiuj geografiaj objektoj forlasu siajn nomojn, kaj estu nomataj nur laŭ la koordinatoj. Tute simple: anstataŭ »Rom« diru nur »Norda-tricent-naŭdek-kvardektri-sep-kvar-unu-kvin«. Aŭ kial memori la komplikan vorton »Sidneon«, se vi povas anstataŭe uzi la simplan »Suda-ducent-sepdekunu-trideknaŭ-sep-ses-du-naŭ«. La krucigoj de la meridianoj kaj paraleloj estu signitaj per lumturoj, kiuj fariĝu religiaj sanktejoj, ĉe kiuj la homaro interfratiĝos.

La tago estu dividita en 20 horojn, la horoj en 100 minutojn, kaj tiuj en 100 sekundojn.

La jaro estu dividita en kvar sezonojn, 52 semajnoj, sen monatoj. Restos unu tago por ĝenerala festo.

La aŭtoro de tiu ĉi broŝuro sendube faris grandan mensan ekzercon, kaj verŝajne kelkaj el liaj proponoj estus utilaj kaj praktikaj.

Tamen: 1) Mi dubas ke tio multon kontribuas al la interhoma frateco, kiel la aŭtoro esperas, same kiel la adopto de la decimala sistemo neniel kontribuas al tio. 2) Mi konsideras ne nur nepraktika sed neebla la supre menciitan ŝanĝon de geografiaj nomoj. 3) La starigo de 80.000 lumturoj sur la teron je egalaj distancoj igus ke el la aero nenio plu estus rekonebla. 4) La ideoj pri la divido de la tago kaj de la jaro certe havas praktikajn elementojn. Tamen, esperi ke ĝi estu »akceptata de la progresemaj esperantistoj« estas pli ol facilanima optimismo. La aŭtoro ja certe memoras ke jam cent jarojn sciencistoj kaj religiuloj proponadas nur iom simpligi la kalendaron, sen ia ajn ŝanco je sukceso pro la konservativeco de la homoj.

Cetere la verketo radias homamon kaj fidon al la estonteco. Ne estas mirinde ke tiaj noblaj ideoj pri la estonto aperas ĉe ĝisosta esperantisto, kia estas sendube la aŭtoro, kun kiu ni plene simpatias.

T. S.

GERIATRIO KAJ LA GENERALA ZORGO POR GEMULTJARULOJ, de Univ. Prof. D-ro J. Zh. R. Schreuder, kaj S-ino A. Diatlowicki-Tobi, kun aldono de f-ino J. van Henten. Tradukis F. F. Faulhaber. Broŝuro ofsetita 44-paĝa, eldono de F. L. E., Nederlando.

En scienca, tamen tre alirebla kaj interesa maniero la aŭtoroj kiuj prizorgas la sekcion por multjaruloj de la Ĝenerala Malsanulejo »Zonnenstraat« en Hilversum, Nederlando, pritraktas la ideon, ke altaĝeco ne estas malsano, sed normala homa stato, kaj tial la pli

aĝuloj devas esti traktataj ne kiel malsanuloj aŭ infanoj, sed kiel plenrajtaj individuoj.

La broŝuro abundas je konsiloj koncerne nutradon, moviĝon, flegadon, danĝeron de ripozo en lito, utilajn por la pliaĝuloj same kiel por iliaj prizorgantoj.

Laŭdinde estas, ke la konata esperantisto F. F. Faulhaber, ankaŭ kunlaboranto de IOE, pretigis la tradukon dum sia restado en la menciita malsanulejo pro parta paraliziĝo. Ni uzas la okazon por deziri al li rapidan resaniĝon.

T. S.

KOMUNLINGVA NOMARO DE EUROPAJ BIRDOJ de Nomenklatura Komisiono de l Ornitologia Rondo Esperantlingva. Eldonis: Esperanto Press, Cardiff, Ontario, Kanado. 68-paĝa broŝuro, formato 12 x 16 cm. Prezo ne indikita.

Post la antaŭparoloj de D-ro W. M. A. De Smet, prezidanto de ORE, kaj R. H. Bossong, gvidanto de Nomenklatura Komisiono, venas la nomoj de 579 eŭropaj birdspecoj (ordigitaj laŭ »Nomina Avium Europaearum« de Jorgensen) en du kolonoj: »Sciencaj nomoj« kaj »Komunlingvaj nomoj«. Post la nomaro venas latina kaj Esperanta indeksoj. Ĉe la fino estas du specimenaĵoj el la »Slipara Vortaro« kaj specimena paĝo el la presprovaĵa Esperanta »Duden Bildvortaro« kun aldona klarigo pri tiu vortaro.

Jen tre valora terminaro verkita surbaze de principoj kiuj povas servi kiel modelo por multaj similaj fakterminaroj, kiuj prezentas bazan kondiĉon por enkonduko de Esperanto en kiun ajn fakon. Laŭdinde estas ke la komisiono ne atendis kolektadon kaj fiksadon de la birdnomoj el la tuta mondo, kaj eldonis nomaron nur de la eŭropaj birdoj, ĉar estas pli bone havi ion kiel komencon, ol nenion. Ĉar la nomaro alportas ŝanĝojn de ĝis nun uzitaj nomoj kaj pluraj nomoj prezentas kompromisan solvon, la komisiono, tute prave, ne konsideras la nomaron definitiva, sed nur »serioza bazo por ĉiuj tekstoj pri birdoj, speciale tekstoj verkataj por la revuo La Mevo«. La Komisiono atendas atentigojn pri mankoj kaj malperfektaĵoj.

IOE speciale salutas la aperon de tiu nomaro, ĉar tiaj kaj similaj terminaroj estas en plena akordo kun ĝia programo.

Sekanto



— Miaj intencoj estas seriozaj, kedu min. Mi proponas al vi seriozan amon dum la daŭro de la tuta kongreso.

Interlingvo pridiskutata en soveta revuo „Novoje vremja, („Nova tempo“)

Dum la unua duono de tiu ĉi jaro en kluraj numeroj de la sovetunia politika semajna revuo »Novoje vremja« legantoj de la revuo pridiskutis la internacian lingvo.

1. ĈU INTERNACIA LINGVO ESTOS BEZONATA?

A. A. Amer, Kairo, UAR — instruisto de angla lingvo skribas: Ni vivas dum malfacila tempo en kiu daŭras militoj — malvarmaj kaj varmegaj. Estas mirinde ke bonintencaj homoj serĉas vojojn por starigo de firma paco. Al tiuj serĉoj apartenas ankaŭ provoj pri kreo de internacia lingvo kies adeptoj asertas ke ĝi plifaciligas la interkompreniĝon de popoloj. La homaj rilatoj estus sendube pli facilaj se ili parolus lingvon komprenatan de ĉiuj senescepte.

Sed antaŭ ĉio — lingvo estas ilo por ĉiutagaj interrilatoj de homoj (nome pro la perdo de tiu ĉi funkcio iom post iom mortis la latina lingvo). Lingvo povas vivi kaj disvolviĝi se ĝi posedas riĉan folkloron kaj literaturon. Enkonduko de iu ajn lingvo (en ĉiutagan uzon de popolamasoj) devas esti tute libervola. Uzo de internacia lingvo estas ligita al neglekto de tiuj principoj. Tial tiu ĉi ideo ŝajnas tute utopia. Hodiaŭ estas pli grave batali por interkompreno — sendepende de la lingvo kiun parolas unu aŭ alia popolo. Kaj la interkompreno povas ekzisti kondiĉe ke homoj de diversaj nacioj, lingvoj, dialektoj kaj rasoj trovu komunan lingvon en la plej vasta senco de la vorto. Ĝi devas esti lingvo de bona volo, de paco, de amika najbareco.

Inter esperantistoj estas multaj batalantoj por interkompreniĝo de popoloj. Ili agadas kontakte kun poparpa movado.

(N-ro 18 de 01. 05. 1971.)

3. PRI INTERNACIA LINGVO
Sekvas letero de V. Jilber, Tur, Francio — ĉefredaktoro de la revuo »Paco«, presorgano de Mondpaca — Esperantista Movado:

Sinjoro A. A. Amer opinias »ke lingvo povas vivi kaj disvolviĝi se ĝi posedas riĉan folkloron kaj literaturon« kaj tial la ideo pri kreo de internacia lingvo estas »tute utopia«.

Tiu ĉi aserto estus justa se oni provus anstataŭ naciajn lingvojn per lingvo internacia. Dume la ĉefa celo de la lingvo Esperanto estas — plifaciligi interkompreniĝon helpe de simpla ilo kiun oni povas ekregi tre rapide.

Inter esperantistoj estas multaj batalantoj por interkompreniĝo de popoloj. Ili agadas kontakte kun poparpa movado.

(N-ro 19 de 07. 1971.)

4. APROBO
Petar Walles, Moldon, Anglujo konsentas:

Mi plene konsentas kun la opinio de la leganto Nguen Van Kiu pri la signifo de internacia lingvo Esperanto. Mi devas diri ke mi kun plezuro tralegis multajn librojn kiujn li mencias.

(N-ro 25 de 18. 06. 1971.)

5. ESPERANTISTOJ POR LA PACO
Hektor Bofejjon, Brashat, Belgujo respondas:

Leganto el Uniginta Araba Respubliko, Ali Antar Amer opinias ke la ideo pri internacia lingvo estas »tu-

te utopia«. Kial devas esti utopia la ideo ke ĉiuj homoj de la Tero ekparolu ne nur en siaj naciaj lingvoj, sed ankaŭ en unu komuna lingvo? ...

Granda plimulto de esperantistoj estas batalantoj por la paco. Ili estas konvinkitaj ke Esperanto, fariĝanta internacia lingvo, en granda grado proksimigus popolojn kaj kontribuos al starigo kaj konservado de la paco en la tuta mondo.

(N-ro 26 de 25. 06. 1971.)


NOTO DE LA REDAKCIO
M. I. Isajev, la ĉefa scienca kunlaboranto de Lingvosciencia Instituto de Sovetunia Scienca Akademio resumis la diskuton de la legantoj, laŭ peto de la redakcio, jene:

Sciencistoj serĉas solvon de tiu ĉi problemoj jam dum pli ol 150 jaroj. Unu parto de sciencistoj proponas akcepti por la rolo de komuna monda lingvo iun naciajn lingvojn per lingvo internacia. Dume la ĉefa celo de la lingvo Esperanto estas — plifaciligi interkompreniĝon helpe de simpla ilo kiun oni povas ekregi tre rapide.

Tial aliaj sciencistoj opinias ke estas bezonata kreo de tute nova internacia lingvo. Tiu ĉi ideo ricevis sufiĉe vastan subtenon. Estis ellaboritaj pli ol 200 projektoj de artefaritaj lingvoj. Vivorajton ricevis nur unu — Esperanto, kiu estas uzata jam dum 80 jaroj.

Konsiderante Esperanton kiel helpan rimedon por interpopola komunikigo, sovetuniaj lingvistoj ne emas troigi ĝian rolon. En centro de la atento de sovetuniaj lingvistoj staras la problemoj pri ĉiugrada disvolvado de naciaj lingvoj kio kontribuas al ĉiufanka progreso de nia multnacieca socio. Sovetuniaj esperantistoj partoprenas en laboro de Mondpaca Esperantista Movado kies devizo estas: »Esperanto estas ilo por paccibatalo.«

Elrusigis kaj kolektis Natinj A. tu-Johanoviĉ, Petropavlovsk, Sovetunio.



— Oni serĉas volontulojn por la Esperanta laborbrigado ...!

DONACOJ POR LA OFICEJO

| | |
|--------------------------|------------|
| J. H. Casto, Meksiko | \$ 50,— |
| F. de S. Almada, Brazilo | \$ 6,— |
| Antaŭe kvitancita | \$ 1095,43 |
| Entute | \$ 1151,43 |

DONACOJ POR LA ĜENERALA KASO

| | |
|----------------------|----------|
| J. H. Casto, Meksiko | \$ 50,— |
| Miloslawa Kolinska | \$ 10,20 |
| Zaga Milosavljević | \$ 4,22 |
| G. C. Fighiera | \$ 20,— |

NOVA SUBTENANTO POR 1971

J. H. Casto, Meksiko

ORA LISTO DE I. O. E.

POR AUGŬSTO 1971

| | |
|--|---------------|
| 1. S-ino Dorothy Henderson, Kanado | US \$ 1349,70 |
| 2. F-ino Betty Salt, Kanado | " " 962,40 |
| 3. H. Scheffler, F. R. Germanujo | " " 286,93 |
| 4. Hans Werner Grossmann, Svisujo | " " 116,24 |
| 5. J. H. Casto, Meksiko | " " 100,— |
| 6. M., Italujo | " " 81,20 |
| 7. Gian Carlo Fighiera, Belgujo | " " 76,— |
| 8-9. Felix-Epstein, F. R. Germanujo kaj Ernesto Sonnenfeld, Urugvajo | " " 75,— |
| 10. Arne Pedersen, Danujo | " " 70,70 |

Plej proksimaj kandidatoj: M. Kolinska (60,91), A. N., F. R. Germanujo (60,45), A. kaj T. Sekelj (po 41,70), V. Kruusalu (34,08), J. Matasin (31,—), Hans Bakker f. (30,63), Kurt Schönrich (27,61), Z. Milosavljević (26,02).

esperanto gazeto

**DUOBLE HELPAS KIU TUJ
DONAS KAJ TUJ (RE)ABONAS!**

PERANTOJ

Argentino: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, ROSARIO

Aŭstralio: Kenneth G. Linton, 11 Poplar St., SOUTH CALFIELD, Vic. 3162. Abono: \$ 2,-

Aŭstrujo: Aŭstria Esperanto Movado, Hofburg, Bathyanystiege, A-1014 WIEN.

Belgujo: „HEROLDO DE ESPERANTO”, 13 rue de la Reinette, Bruselo 1., Abono 100 b. fr.

Brazilo: Alfredo Enio Duarte, Caixa Postal 18 (Esperanto) ZC OO, RIO DE JANEIRO, E-GB; kaj KULTURA KOOPERANTIVO DE ESPERANTISTOJ, Avenida 13 de Maio, 47 Sl. 208 RIO DE JANEIRO, ZC-06

Britujo: Brita Esperanto Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W 11.

Bulgario: Petr Ivanov Mutafčiev, ul. Persenk, bloko 20-A, SOFIA-7, tel. 62 18 24; kaj Jordan D. Kalinov, Bul. „G. Dimitrov”, bl. „Debeljanov” A-20, RUSE. — Tel. 25877. Abonprezo 5 levoj.

Ceĥoslovakio: Jos. V. Otta, Vančurova 34, ŠUMPERK Jarabono 44 Kĉs. kaj DOVOZ TISKU, Praha 2 Vinohrady, Vinohradská 46.

Danujo: Ing. Uwe Lohse, str. Bakkesvinget 5, 3400. TULSTRUP/Hilrd. Poŝtgirkonto 14 41 16. Abono DK 14.—

Finnujo: Joel Vilkki, SOMERO-9.

Francujo: F-ino Germaine Kirtz, 5 bd des Alliés, F-68 MULHOUSE, Pĉk STRASSBOURG No 993.48.— Abono: F 12,50

Germana Feder. Resp.: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 WOLFENBÜTTEL; poŝtekkonto: Karlsruhe 1154 71.

Grekujo: Kimon G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos str. NOVA SMIRNA — ATHINA. Tel. 931-214.

Hindujo: Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, NEW DELHI-1.

Hispanujo. Juan-Luis Vallés, Apartado 7018, BARCELONA. Abono 140 pesetoj.

Hungarujo: Gyarmathy Zsolt, Aprilis 4 tér 28, GYULA. Abonpr. 80 Ft.

Israelo: Ben-Alder Jehiel, P.O.B. 379 PETAH TIKVA Ab. 6 liroj. Poŝtekk. Bank Hadoaz 4-45854-8.

Irlando: Pat O'Reilly, „Woodbine”, Bluebell, Dublin 12.

Italujo: Dott. Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gal-

leria Astra), 37100 VERONA. Abono 1.200 Liroj, poŝtgirkonto n-ro 28/22942.

Japanujo: Internacia Fako, OOMOTO, Kameoka, Kio-to-hu

Jugoslavio: IOE, 11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14 ĉk 608-8-1353-10. Abono 20 din.

Kanado: W.D.B. Hackett 326 Soudan Ave, TORONTO 7. Ont.

Kubo: Raúl Juárez Seden, Apartado 570, CAMAGÜEY.

Madagaskaro: Eugène Ravéloson, Boite Postale 1678, TANANARIVO.

Meksiko: F-ino Margarita Nájera S., Apartado Postal M-9310, MEXICO-1-D. F.

Nederlando: Ing. D. Klage, Talingstr. 8., SCHOORL (NH). — Abono 7,50 hfl al Boerenleenbank Schoorl (NH), Kto 5082 R.

Norvegujo: Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S), Box 942, OSLO 1., Poŝtgirkonto 100.31.

Novzlando: J. T. Allan, 12 Lonsdale ave., RONGOTAI, WELLINGTON 3.

Pollando: S-ino Miloslawa Kolinska, Sopočka 2/2, SZCZECIN

Portugalujo: D-ro A. César Anjo, Av. 28 de mayo 12, VISEU.

Rumanujo: Maria Vitályos, C, postala 14, TIRGU SECUIESC, jud. Covasna.

Sovetio: Ivan Palkin, ul. Švernika d 7. korp. 3, kv. 44, MOSKVA M-448. (tel. 126-57-78).

Johannes Palu, Sölme 21, TALLINN 16.

Panas Vasilĉenko, Poŝkesto 375, KIEV 24.

Abonprezo 4 rub.

Svedujo: Gerhard Nyqvist, Johan Skyttes väg. 5 JÖNKÖPING. Poŝtgirkonto 89 299.

Svisujo: Claude Gacond, Miéville 133, CH-2314 LA SAGNE. Abono 9 Sv. Fr.

Usono: Conrad Fisher, R.F.D. No. 1., MEADVILLE, Pa. 16335.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Aptdo. 146, VALENCIA, Edo. Carabobo.

El ĉiuj aliaj landoj perantoj serĉataj. Perantoj ricevas 20%-an rabaton por kovri la kostojn.

ABONPREZO: 2 dolaroj aŭ egalvaloro